

Heinrich Heine,
Tia la mondo

tradukita de Kálmán Kalocsay

Kiu havas multe, baldaŭ
havos eĉ pli grandan riĉon,
kiu havas nur malmulte,
perdos eĉ la nesufiĉon.

Kaj se vi nenion havas,
enterigu vin prefere,
ĉar vivrajton, tramp', nur havas
kiur ion havas tere.

*Traduko de la Germana poemo "Weltlauf" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, *1911 – †1976).*

Arg-48-1077 (2010-05-21 13:08:59)

Heinrich Heine,
Tia estas la mondo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Se vi havas multon, vi
Baldaŭ ekposedos plion.
Se malmulton havas vi,
Oni prenos ankaŭ tion.

Lasu entombigi vin,
Se vi havas, aĥ, nenion –
Ĉar vivrajton havas nur
Tiu, kiu havas ion.

*Traduko de la Germana poemo "Weltlauf" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04).*

MR-239-1 / Arg-48-95 (2003-10-25 19:56:49)

Verkita de la poeto Hejno, Henriko (HEINRICH HEINE, 1797 - 1856).

Esperantigis: Manfredo Ratislavo en Oktobro de 1990 laŭ la origina germanalingva teksto.